

1921-05-26-sergeant-fousek_1

Kara samideano

Mi legis kun mia kutima plezuro vian afablan & interesan leteron de la 16-a kiun mi ricevis la 21-an. Kiel vere estas agrable povi interŝanĝi ideojn kiel ni. Esperanto estas ideala **framasonareco?** kiu permesas elekti amikojn samguste, samideale kiel vi, ĉu ne?

Certe, la foto multe interesis min & mi pensas kiel vi, ke la junulino estas certe pli bela ol s-ino B. sed tiu lasta ridas & ŝajnas tiel afabla. Afableco, inteligenteco, ĉarmeĉo allogas pli ol puraj, belegaj trajtoj. Sed kiel vi diras estas malfacile juĝi personojn je fotografaĵojn.

Dankon pro via anekdoto pri pluvombrelo. Vi certe estas gaja, ŝercema homo, ĉu ne?

Mi hontas pro Scota Viator. Mi ne pripensis, ĉar mi bone sciis tion kvankam mi neniam lernis latinan lingvon.

Por ŝanĝi (!!!) mi ankaŭ pensas kiel vi pri la nomoj. Oni ne devas ŝanĝi ilin je traduko

1921-05-26-sergeant-fousek_2

& nur skribi ilin laŭ la elparolado. Boulogne sur Mer estas malfacila sono - tiu „gue“ precipe. Oni povus skribi Bulonje sed oni ne devas elparoli é sed eu kiel en la franca vorto vieux, mieux, pieux – Sur-mer, ne estas sir-mer. Estas la u franca, malfacila por alilanduloj. Ĉu Fousek signifas „barbeto“?

La ekzemplo de Wassergasse por Vodička estas vere germana, **boŝa!!!**

Kiel via koncerto certe devis esti belega. Sed malfeliĉuloj pro varmeco!! Mi malamas senaeraj, varmecojn. Nuntempe sur mia dormĉambra balkono estas 45° centigradoj sed dolĉa, milda vento ekzistas – ĉar la maro ne estas malproksime. Mi malŝatus vivi en interlandoj sen vento – ekz. en la valoj.

Sendube, vespere, ni aŭdos fulmotondron, ĉar estas ĉiam tie same post varmaj tagoj. Eble la famaj makuloj en la suno estas la kaŭzo – lundon estis malvarme kiel en vintro, mardon oni preskaŭ svenas pro varmeco – ne estas normala.

En Ameriko & aliaj landoj, ili havas la saman fenomenojn pro tiuj makuloj... tamen ni ludos tenison... & mi ne maldikiĝas!!! De post la morto de mia patrino mi dikiĝis (stranga afero!!!) sed mi fartas multe pli bone. Mian tutan vivon

1921-05-26-sergeant-fousek_3

mi volis dikiĝi & nun mi ne scias ĉu mi devas esti kontenta aŭ ne? Mi pezas 60 kiloj & antaŭe 56, 57, 58. Ne ĉiam same. Kelkafoje nur 50 aŭ 51 kiloj. Mia edzo pli ŝatas – mi, mi ne scias.

Nun, mi klarigos pri „golf“ - tiu nacia angla ludo kiu pasigas tiom da personoj. Cert, tiu ludo daŭras 2 horoj eble pli. Privata persono neniam povas havi tiun grandan ludejon.

Estas klubo! La surfaco estas certe egala al 10 grandaj kampoj. Certaj ludoj nur havas 9 truojn anstataŭ 18. Vittel eĉ havas 12. Mi sendas al vi planon de tiu Vittel golf. Ĝi hlepas vin por la komprenado. La verdaj rondoj kun numeroj estas la truoj kiuj havas 0 m 10 centimetroj da diametro – oni komencas je ĉiu verda kvadrato.

Tiuj malgrandaj strekoj kiuj ??? la ruĝajn liniojn estas baroj, malhelpaĵoj kiuj pli malfaciligas la ludon. Ili estas faritaj kiel verdaj kreskaĵoj – aŭ el sablo, kelkafoje ili estas altaj, kelkafoje grandegaj truoj en la sojlo. La ciferoj malsupre de la plano: 325, 340, 350 k.t.p. Estas la altaĵoj de la kamparo. La golf ludejo apud Boulogno estas tre granda, tre bela, sur krutaĵo & oni spieras

1921-05-26-sergeant-fousek_4

la maran aeron samtempe kiel la kamparan aeron. Ke maljunuloj 10 jara povas ludi al tiu ludo. La pilkoj estas tiele: tre malmolaj & facile mortigus homojn – ĝenerale oni frapas ĝin 4an 5foje inter ĉiu truo. Ekz. bona ludanto ĉe ni (por la 18 truoj) frapas ĉirkaŭ 80foje. Oni ofte perdas pilkojn, ĉu en akvo, ĉu en alta herbaro. Sed, ĉu ne ekzistas golf apud Praha?

Kial vi diras ke mi ne kredas ke la ĉielo ekzistas? Mi ne pensas ke mi diris tion al vi, ĉu ne? Mi ne povas diri ĉu mi kredas ke ĝi ekzistas aŭ ne – sed mi ne kredas ke ĝi ekzistas laŭ la opinio de Rom.Kat. stratoj, **pavumitaj** Je oro, muziko & anĝeloj kiuj kantas. Ne, mi ne pensas ke post la morto ne estas finata sed... kio?...Jen mi ne scias – tute ne. Sed mi ne pensas ke oni devas suferi poste pro siaj eraroj sur tiu tero. Estas tro maljuste.

Tiom da diversaj cirkostancoj helpas al la eraroj tie ke la pli ofte ne estas la vera kulpo de la pekinto.

Estas afero de temperamento, edukado, ĉirkaŭecoj, k. t. p.

Hieraŭ mi vizitis amikinin kiu havis du tagon antaŭe knabeton. Ili fartas tre bone kaj mi pensis al vi & al via edzino. Kiel vi estas feliĉa, ĉu ne? Mi malaprobis la vizitojn tiel proksime de la akuziĝo, sed la edzo estas fama **ĥirurgiisto** kun „kliniko“ & li invitis min. Do, mi iris, sed en Anglujo tio neniam estos permesata antaŭ 9 tagoj

1921-05-26-sergeant-fousek_5

Sed, mia amikino (kontraŭe de mi) estas tute nenervema & ne ŝajnas malsana aŭ laca. Kontraŭe. Kion vi deziras? Filinon aŭ filon? Mi supozas filon.

Jen de pli ol 8 tagoj, pentristoj estas hejme. Ili (kvarope) pentras la eksterajon & fenestroj & fenestraj kovrilojn. Estas granda afero & tio daŭros du semajnojn. La domo estas blanka pentrita, je „silexior“. Estas sorto de pentraĵo malbrila sen oleo. Mi malŝatas tiun epokon. Ĝenerale antaŭ la milito ni farigis tion ĉiu du jare. Nun tio ne estis farita de 1913.

Ho! **ve** mi tute ne povas diri ĉu ni iros Kongreson aŭ ne! Mia edzo ne volas decidiĝi. Mi ŝatus iri & li ne ŝajnas voli. Tio ŝajnas al li tiel malproksime laciĝante & multekoste. Do, mi ne scias. Tamen li diras ke ni iros al Ŝtrasburgo k. t. p. en Alsaco. Mi proponis ke li restu en Ŝtrasburg & mi iru al Kongreso & li tute aprobis. Sed, mi bedaŭrus ĉar mi ne ŝatas vidi belaĵojn sen li & plie li estas ĉiam tiel amata de ĉiuj ke mi ne volas ke oni konatiĝu kun mi sen li. Do, la estonteco montros. Sed, kiel mi estus disrevigita se vi ne venus. Mi ne povos

1921-05-26-sergeant-fousek_6

kredi ke vi ne venos la tutan semajnon. Mi ŝatus fari la postvojaĝon al Karlsbad k. t. p. Ĉu estas facile trovi en Praha ĉambrojn en hotelo sen skribi antaŭe. Pri la restoracioj oni trovos ĉiam. Mi vidis en „Esperanto“ ke la vojaĝo Praha-Strassburg-Paris estas 71 ₣ + 77 ₣. Tio estas malpli koste ol mi pensis. Tamen estas 50 ₣ en Boulogno. Fine estos ĉirkaŭ 1000 ₣ por du.

Nun mi devas eliri & ne plu havas tempon & cetere, mi rimarkis ke mi skribis iom longe sen diri aŭ rakonti ion interesan. Do, pardonu min & kredu min ĉiam sincere & samideane

Alice S.

Ankoraŭ grandan dankon por via ĉarmaj leteroj.

27-a de Majo

Ho, kiel vi estas ĝentila sendi al mi P.K. de Poděbrady. Sendi **penŝon?** al amikino Esperantista kiam oni ekskursadas kun sia edzino estas granda merito. Dankon sinceran. Tre bela & stranga estas la bildo. Mi vojaĝis en Tatraj montoj (Zakopane, Morskie Oko) en similaj lignaj veturiloj. Tiu modo de vojaĝo ni devas esti oportuna por via edzino!